


KOMENCANTO

gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Vinnikova Nina
[N. Altajsk, Rusio]

Somera mateno

2002

Kiel Georgij Kokolija, Prezidanto de REU iĝis komencanto
literatur-historiaj paĝoj — lirike de Francio ĝis Japanio — por gajaj
instruantoj kaj scivolemaj lernantoj — neelpensitaj historioj
tempo kaj homoj — aforismoj — anekdotoj — invitoj kaj informoj
korespondu!

3

Perantoj de KOMENCANTO

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian gazeton

Argentino Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

Britio Esperanto-Asocio de Britio, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DG.

Ĉeĥio Vladislav Hasala, A.Dvorĥka 1, CZ-696 62 Strŕoznice

Danio Revuservo de Dana Esperanto-Asocio Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800, Nykobing F.

Estonio Virve Ernits, Villimaa 17 — 8, EE 93812, Kuresaare.

Finnlando Heta Kesala, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

Francio ~ Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

~ R.Melo, 34, Av. de Russie, FR-03700, Bellerive S/A

Germanio Dr. Wolfgang Sehwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

Hispanio Pablo Vicente Valero, adv, Obispo Quesada n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.

Irano Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

Italio Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi, 38, 20143, Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio

Viŝnja Brankoviĉ, Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

Kubo Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, HAVANO

Litovio Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 OSLO

Pollando Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

Svedio SEF, Lisbet Andreasson, Sodra Rorum pl 455, SE — 24294 Horby

Svislando Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

Usono

Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

redakcie

Karaj legantoj!

La 3-a numero de "K-2002" aperas somere kaj tial komenciĝas de la bildo de *N. Vinnikova* "Somera mateno" sur la kovrilo.

La enhavo de tiu ĉi kajero estas tradicia. Ĉe la rubriko "Kiel tio komenciĝis" vin salutas Prezidanto de Rusia Esperantista Unio *Georgij Kokolija* kun rakonto pri sia esperantistiĝo.

Sur la literatur-historiaj paĝoj vi trovos la finan parton de la prezento de soveta verkistoj de la dua literatura periodo. Ĉi foje vi legos pri la vivo kaj kreado de *V. Eroŝenko* kaj *V. Varankin*.

Sur la lirika paĝoj ni publikigas originalan noveleton de nia itala legantino *S. E. Bullo* kaj japanajn hajkojn, kiujn verkis nia leganto el Francio *Yves Brusio*.

En la temo de amuza gramatiko "Por gajaj instruantoj kaj scivolemaj lernantoj" ne mankas diversaj ŝercaj kaj seriozaj konsiloj kaj bildoj pri lernado-instruado...

En la rubriko "Neelpensitaj historioj" vin distros veraj okazintaĵoj de diversaj aŭtoroj el diversaj landoj. Ĉe la temo "Tempo kaj homoj" ni prezentas laŭtemajn fragmentojn el libroj de klasikaj E-aŭtoroj. Ambaŭ paĝojn sprite ilustris *Katja Nosova* el Rusio.

Por la 14-a paĝo nia leganto el Brazilo *Jose Roberto Tenorio* verkis interesan dialogon el proverboj inter du virtualaj babilantoj. Tiu temo respeguliĝas ankaŭ ĉe la najbara paĝo, kie ni konatigas vin kun uzado de Esperanto en Interreto.

Inter la adresoj por korespondi vi vidos bildon de *Dmitrij Prokopjev* el Rusio.

Agrablan legadon!

Viaj donacoj por *KOMENCANTO* ĉiam bonvenas!

KOMENCANTO

2002 numero 3 // (34) // 6 numeroj jare
regule aperas ekde 1997

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev
konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova
adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: komencanto@r66.ru

abontarifo por 2002:

internacia tarifo: 15 eŭroj aŭ \$15;

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: \$13;

aŭ por ĉiuj — 16 IRK

konto ĉe UEA: vkud-a

rusia tarifo: 120 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. ящ. 132.

Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el "K".

La sola kondiĉo - nepre menciigi KOMENCANTO'n, la nomojn de la aŭtoroj kaj ties loĝlokojn.

Kiel tio komenciĝis

Georgij Kokolija

Prezidanto de Rusia Esperantista Unio, komitatano de UEA,
redaktoro de Rusia Esperanto-Gazeto

... mi klare komprenis, ke Esperantujo estas fabela unika lando, en kiu mi sentas min plej bone kaj komforte, ...



En la infanaĝo kaj junaĝo mi estis sufiĉe scivolema, multe legis diversajn librojn kaj pro tio sciis, ke Esperanto estas iu lingvo, speciale kreita por internacia komunikado.

Kaj jen, decembre 1980, kiam mi studis en Tbilisa Ŝtata Universitato, mi ekvidis sur la anonctabulo en mia fakultato la informon pri lanĉo de E-kurso, kiu devis okazi tiuvespere. Pro scivolemo mi volus iri al la kurso, sed ne ŝatus iri sola. Sed mi ne sukcesis persvadi iun el miaj samkursanoj viziti la kurson kune kun mi. Do, veninte hejmen mi komencis mediti, ĉu mi iru al la kurso aŭ ne. Tiutage pluvis, kaj finfine mi decidis jene: se la pluvo ĉesos, mi iros al la kurso, se daŭros — ne iros. Kiel vi verŝajne konjektas, la pluvo ĉesis.

Dum la kurso pro ioma pigremo mi lernis la lingvon ne tre diligente kaj post kursfino povis nur iom balbuti Esperante. Kaj tiel daŭris iom da tempo, ĝis mi trafis la unuan fojon al E-tendaro. Ĝi estis OkSEJT-26 apud Jerevano en 1984. Kaj tie mi klare komprenis, ke Esperantujo estas fabela unika lando, en kiu mi sentas min plej bone kaj komforte, kaj kie mi multon perdas pro malbona scio de la lingvo.

Reveninte hejmen mi prenis la saman lernolibron de Kolker, per kiu mi studis la lingvon en la kurso, kaj mem trastudis ĝin denove. Jam sekvajare, en MET (Mezazia E-Tendaro) apud Duŝanbe mi estis elektita kiel "Mister Esperanto".

Ekde tiu tempo mi ne imagas mian vivon sen Esperanto. Ĝuste dank'al tiu ĉi lingvo kaj multegaj partoprenitaj de mi E-aranĝoj (unuavice OkSEJT-oj) mi fariĝis tia, kia mi estas nun. Mi certas ke sen ĉio ĉi mi estus alia, malpli malfermita kaj komunikigema.


Ĉar mi ŝatas ne nur ricevi, sed ankaŭ redoni, mi strebas fari por Esperanto kaj esperantistoj tion, kion mi kapablas. Tial dum preskaŭ ĉiuj jaroj de la esperantisteco mi aktivas en rusia (antaŭe soveta) E-movado. Mi estis unu el ĉefaj aktivuloj de SEJM-2, A-komitatano de TEJO por Sovetio. Dum lastaj jaroj mi ak-

tivas en Rusia Esperantista Unio (REU).

Nun mi estas la Prezidanto de REU kaj A-komitatano de UEA por Rusio. Krome dum lastaj du jaroj mi redaktas la gazeton REGO, komunan eldonon de REU kaj REJM, kiu aperas ĉiun duan monaton.

Ĉefaj celoj de mia E-agado estas unue informi plej multajn neesperantistojn pri nia lingvo kaj eblecoj, kiujn ĝi povas doni al ajna homo, due — helpi al la dezirantoj lerni Esperanton, kaj trie — helpi al posedantoj de la lingvo perfektigi en ĝi, ricevi plezuron kaj utilon de ĝia uzado. Kaj certe mi ĉiam klopodas mem ricevi utilon kaj plezuron de la uzado de Esperanto.

Garik Kokolija (Moskvo)



SEJM — Sovetia Esperantista Junulara Movado
SEJT — Sovetia Esperantista Junulara Tendaro (post 1992 = Somera Esperantista Junulara Tendaro). OkSEJT — Okcidenta SEJT
TEJO — Tutmonda Esperantista Junulara Movado
REGO — Rusia Esperanto-Gazeto

Al ĉiuj legantoj de "Komencanto" mi deziras rapidan perfektigon en la lingvo, por ke vi povu legi kaj ĝui ĉiujn gazetojn kaj librojn en Esperantujo.

Amike, ekskomencanto

La dua periodo de esperanta literaturo

Sovetaj
verkistoj

Karaj legantoj,

Nian rakonton pri sovetaj verkistoj de la dua literatura periodo kronas prezento de du aŭtoroj, kiuj havis neordinaran kaj eĉ aventuran vivon kaj kies verkoj sendube riĝis la mondan esperantan literaturon. Tio estas Vasilij Eroŝenko kaj Vladimir Varankin.

Vasilij Eroŝenko

estis homo de multflankaj talentoj: pedagogo, muzikisto, verkisto. Naskiĝis V. Eroŝenko en vilaĝo Obuĥovka de Kurska gubernio, Rusio, en 1890. Li estis kvarjara, kiam post la malsano iĝis tute blinda. Fininte la lernejon por blinduloj en Moskvo, li laboris poste en la orkestro de blinduloj.

Kun la lingvo internacia li konatiĝis en 1911 kaj per helpo de Esperanto li multe vojaĝis tra la mondo, malgraŭ sia blindeco. En 1912 li entreprenis sian unuan esperantan vojaĝon al Britio, kie ricevis eblon lerni en la muzika Akademio por blinduloj ĉe la Regna Instituto por blinduloj en Norvud.

Printempe de 1915 Eroŝenko venis Japanion kaj studis masaĝon ĉe blindula lernejo en Tokio. Tie li aktive propagandis Esperanton inter la blindaj studentoj. Post du jaroj li vojaĝis Siamon kaj mem fondis tie lernejon por blinduloj. Transveturante Hindion li estis tie arestita kaj poste elpelita kiel rusa bolŝeviko. En somero 1919 li forkuris tra Ŝanhajo denove al Japanio. V. Eroŝenko bone posedis japanan lingvon kaj verkis en tiu lingvo multajn rakontojn por geknaboj kaj tiel famiĝis inter la japana literaturistaro. Post la 1-a de majo 1921, kiam li partoprenis en laborista manifestacio kaj en kongreso de japana socialista federacio, Eroŝenko estis denove arestita kaj elpelita. Tiam li venis Ĉinion kaj en 1922 prelegis lekciojn pri rusa literaturo en Pekina

universitato. En 1923 en Ŝanhajo aperis la unua esperanto-verkaro de Eroŝenko "Ĝemo de unu soleca animo", kiu enhavis memoraĵojn de la aŭtoro pri lernejaj jaroj, fabelojn kaj la faman poemon "Ciganino", per kies deklamo li gajnis la unuan premion en la 15-a UK de Esperanto en Nurnbergo, 1923. Reveninte al Rusio en 1923, li vivis kaj laboris en Moskvo, en Ĉukotka, en Turkmenio kaj Uzbekio.

V. Eroŝenko verkis poemojn, novelojn, rakontojn, fabelojn en japana lingvo kaj en Esperanto. Lia plena verkaro estis eldonita en Tokio en 1959 en japana lingvo, poste aperis en Esperanto "Rakontoj de Eroŝenko", "Lumo kaj ombro", "La tundro ĝemas" kaj "Malvasta kaĝo". Kelkajn rakontojn de Eroŝenko tradukis al la ĉina lingvo fama ĉina verkisto Lu Sin, kiu estis amiko de Eroŝenko.

Post la morto de la verkisto multaj el liaj verkoj, eldonitaj en Esperanto, estis tradukitaj al la rusa kaj ukraina lingvoj. La verkoj de Eroŝenko allogas per sia simpla, sincera, iom naiva stilo. Ĉi tie vi povas legi fragmenton el la rakonto de Vasilij Eroŝenko "El vivo de ĉukĉoj".



Kakume

Ju pli grandiĝas niaj mondaj urbejoj, la centroj de la civilizacio, des pli malgrandiĝas la homo, des pli li banaliĝas kaj trivialiĝas, bagateliĝas kaj mizeriĝas, ĝis fine li estas nura mikrobo, sensignifa bacilo, pri kies vivo kaj morto neniu plu interesiĝas. Kaj gravas tiam ne la homo mem sed lia kapitalo, ne lia kapo sed lia poŝo, ne lia koro sed lia oro.

Tute alie estas en la arka regiono de la nord-orienta Azio, en la Tundro de la ĉukĉoj. Tiu arka dekdumilpersona popolo dividita en grupetojn de kelkaj individuoj, kiuj loĝas en la multmilkilometra tundro ofte je centmejlaj distancoj unu de la alia. Tie oni lernas ŝati la homon mem, ĝuste taksu lian vivon, respekti lian liberecon. La ĉukĉo scias interesiĝi pri sia najbaro ĉu proksima, ĉu malproksima, ĉu samgenta, ĉu alilanda; li pretendas koni ĉiun homon en la Tundro; li fieras scii ĉion pri ĉiu kaj provas helpi al ĉiu en ĉio bona kaj honesta.

Mi alvenis al la ĉukĉa kulturbazo apud la golfo de Laŭrenco ĉe la Beringa markolo en la fino de julio 1929 kaj pasigis tie kelkajn ege angorajn monatojn de mia certe aventurplena vivo.

Kiam mi ankoraŭ estis je distanco de multaj centmejlaj de la bazo, la bazanoj jam sciis pri mia alveno. La ĉukĉoj rakontadis al ili, ke venas norden mirinda blindulo por viziti sian fraton, la bazan veterinaron, kiu jam delonge forgesinte ĉion kaj ĉiujn iris vagadi en la plej nepenetreblajn angulojn de la tundro por pristudi tie la vivmanieron de la ĉukĉaj cervaroj. La ĉukĉoj sentis kiel sian sanktan devon informi la veterinaron pri la alveno de lia blinda frato, kaj ili faris tion multe pli rapide ol ĉiuj radiostacioj de la Nordo.

La ĉukĉoj rakontis entuziasme, ke la blindulo ludas ŝakojn kaj estas ŝakĉampiono de la ŝipo, sur kiu li vojaĝas; ke li vizitis multajn landojn sed amas nur unu nekonatan al ili landon, Esperantujon; ke li scias kelkajn lingvojn, eĉ la amerikan, sed preferas al ĉiuj la internacian lingvon esperanton; ke li konatiĝis kun multaj popoloj sed pleje ŝatas la ĉukĉan. Misteroze ili komunikadis, ke la blindulo iam ludis multajn muzikilojn, sed nun li ludas nenion, ĉar...; li iam kantis siajn proprajn kantojn, sed nun li ne kantas plu, ĉar...; iam li ofte ridis, sed nun li eĉ ridetas malofte, ĉar... Kaj la tundra fantazio eklaboris.

Veninte al la bazo, mi petis tuj unu el la kunlaborantoj de mia frato, ke li konatigu min detale kun la plano de la bazo, ke li montru al mi ĉiujn vojojn kaj vojetojn al la maro kaj al la tundro, al la montetoj kaj al la lagoj. Vespere mi promenadis jam sola kun mia bastono ĉie tra la bazo. Tio ŝajnis superi ĉiujn atendojn de la ĉukĉoj, tute konsternitaj ili nur njetadis: «Kakume, kakume! (Mirego, miraklo!)» Kaj Kakume iĝis mia nomo en la Tundro.

Vladimir Varankin

soveta E-verkisto, kies nomo iĝis unu el la plej elstaraj en la soveta Esperanto-movado de la 30-aj jaroj. Profesie li estis do-cento pri okcidenteŭropa historio, kaj direktoro de Moskva Pedagogia Instituto por fremdaj lingvoj.

V. Varankin naskiĝis la 12-an de novembro 1902 en la urbo Niĵnij Novgorod ĉe Volga. Li lernis en la urba gimnazio kaj dum la lasta lernejo en 1919 studis Esperanton. Iom poste li organizis en Niĵnij Novgorod gubernian unuigon de junaj esperantistoj, kiuj vaste disvolvis la Esperanto-movadon. Varankin uzis siajn plurajn talentojn (li bone kantis, pianludis, pentris) por gvidi kursojn, surscenigi agitspektaklojn, kiujn li verkis mem aŭ tradukis.

En 1922 en Niĵnij Novgorod estis translokigita la kavaleria lernejo el urbo Tverj, kaj Varankin eklaboris tie. Interese, ke estis trovitaj la rememoroj de unu el iamaj studentoj de tiu lernejo S. Lemeŝev, kiu poste iĝis fama soveta opera kantisto. En siaj rememoroj li skribis pri la "estro de la kluba fako" (V. Varankin), kiu instalas lin por la rolo de ĉefa heroo en la vodevilo.

En 1923 la kavaleria lernejo estis translokigita ree al Tverj kaj kune kun ĝi tien forveturis V. Varankin. Ankaŭ en Tverj li organizis urbajn kursojn de Esperanto. En 1927 li estis komisiita respondeci pri la agit-propaganda laboro de SEU (Sovetrespublikara Esperantista Unuiĝo), li translokiĝas en Moskvon. Kune kun Ernest Drezen (Prezidanto de SEU) Varankin veturis al Danzig por la 19-a UK de Esperanto.

En Moskvon Varankin ne nur gvidis la ŝtatajn Centrajn kursojn de E-to, sed faris ajnan laboron, ligitan al Esperanto: estis kunaŭtoro de lernolibro por laboristoj, kreis esperantologian verkon "Teorio de Esperanto" (1929). Samtempe li finis instituton de internaciaj rilatoj kaj iĝis direktoro de la fremdlingva lernejo, kiu poste iĝis transformita je la Moskva ŝtata pedagogia instituto de fremdaj lingvoj. En SEU dum mallonga tempo Varankin estis elektita kiel estro de organiza fako, vicprezidanto, kaj, fine, ĝenerala sekretario de la Tutrusia Komitato de SEU. Li ankaŭ iĝis membro de la lingva komisiono. Kiam en 1932 N. Nekrasov komencis eldoni la kultur-beletran revuon "Nova etapo", V. Varankin eniris ĝian redaktan komitaton, publikigis sur ĝiaj paĝoj apartajn ĉapitrojn de sia romano "Metropoliteno". En 1935 li gvidis la katedron de la tutmonda historio en Moskva histori-arkiva instituto.

Sed en tiuj jaroj ankaŭ la esperantistojn atingis jam la ondo de arestoj, kiuj vaste disvolviĝis tra Sovetio (tielmaniere interne de la lando estis realigita ideo de Stalin pri "akriĝo de klasbatalo"). Ankaŭ Varankin estis arestita februare de 1938 kaj kondamnita je 10 jaroj en forajn koncentrejojn sen rajto de korespondado. Al li estis anoncita tipa akuzo, kiun aŭdis multaj el la arestitaj dum tiuj jaroj esperantistoj (E. Drezen, N. Nekrasov kaj aliaj): "Vi estas aktiva membro de la internacia spiona organizo, kiu kaŝiĝis sub la nomo de Sovetrespublikara Esperantista Unio". En oktobro de 1938 V. Varankin estis mortpafita.

Dum sia mallonga kaj tragedia vivo li ne multon sukcesis verki, sed lia originala romano "Metropoliteno", kiu la unuan fojon aperis en 1933 en Amsterdam en la eldonejo "Ekrelo" kaj en 1977 estis reeldonita en Kopenhago, ricevis altan takson. William Auld nomis ĝin "forgesita ĉefverko" kaj metis en la liston de 50 eminentaj verkoj, kreitaj en Esperanto dum 100 jaroj de ĝia ekzisto. Kaj jen interesa fakto el la letero de la filino de V. Varankin Feina Varankina:

"Krom "Metropoliteno" li havis ankoraŭ unu pli fruan romanon "Kaptita de pasio", kie li priskribis sian amon al Hanna, polino el Gdina. Tio okazis antaŭ lia edziĝo, kiam li vojaĝis al Pollando... Manuskripton de tiu romano li legis hejme en ĉeesto de esperantistoj ruslingve. Ĉu ĝi estis eldonita, ne estas sciata".

Al via atento, karaj legantoj, ni prezentas ĉi-tie malgrandan fragmenton el la romano de V. Varankin "Metropoliteno".

Vladimir Varankin
en kavaleria lernejo, Tverj, 1925



METROPOLITENO

fragmento

Berlin ... de aprilo 1928.

Berlina aero instigas al verkado. Ĝi kreas la humoron. Mi, kiel ĉiu inteligentulo, ne povas verki sen la humoro. Jen, ekzemple: tra la malfermita fenestro estas videblaj mallarĝa tegola tegmento, radiomasto, du mansardaj fenestroj kaj kamen-tuboj. Malsupre kuŝas ŝtona puto — la korto kaj aŭdiĝas kanto pri Stefano Razin. La konata melodio sonas mirinde korduŝe. Fingroj de la lerta harmonikisto faras el ĝi jen molan, dolĉan muzikon, jen fortan, potencon proteston. La harmonikisto ne havas piedojn kaj staras per iuj strangaj tre mallarĝaj kaj mallongaj hakpecoj.

Subita ekstremo trapenetas min. Mi rememoris unu aŭtunan vesperon. Per ĉi tiu novembro nebula vespero mi komencas mian romanon.

Malvarma vento malgaje ekbojis sub la ponto kaj fajfante jetis sin tra gisa balustrado supren. Unusola palverda lanterno ege ekbalanciĝis. Supre ekrincis, kunpuŝiĝinte, la metalfadenoj kaj plende ekbruis. Sur nigra supraĵo de Jaŭzo sin kaŝante de ies persekuto rapide traglitis striaj makuloj. Pelata de l' vento kun furioza sonoro trakis la ponton tramvagono. Malhelaj siluetoj gluiĝis al ĝiaj vandoj, konvulsie kurbiĝante. Kroĉemaj manoj kaptis unu la alian. Kelke da piedoj pendis en la aero. Insultado eksonis sur la platformo kaj ies voĉo ekkriis: «Trapasu do kamarado, mi falas!» La vagono malaperis post stratangulo.

Senmova restis la malviva luno, enŝlosita en duobla kolora cirklo, senmova restis ĝia pala luno, falinta sur glaciigitan teron tra la frosta pikanta aero, senmova estis milicano ĉe la stratangulo, envolvita en varma mantelo. Senmove rigidiĝis sur la ponto super la rivera faŭko iom fleksita vira figuro. La homo jam delonge staris ĉi tie. Per lacaj okuloj li postsekvis trakurantajn preter li vagonojn kaj malaprobe balancetis la kapon. lufoje li sin tumis al la rivero kaj silente rigardis la nigran akvon.

Lia rigardo estis iom mirigita. Kvazaŭ lin zorgigis la penso: kial ĉi tiu riveraĉo ĝis nun ne glaciĝis?

La vento ekŝiris kolumnon de lia mantelo.

...

Santi Elena Bullo
originala novelo (kaj la bildo)
[Mestre, Italio]

Hazarde, en Parizo ...

Estis bela somera mateno: sinjorino Mireille Verner apogis sur la ŝtuparplataĵo la korbeton, kiun ŝi kutime portis kin si. Poste ŝi volis preni la ŝlosilon por malfermi la pordon de sia loĝejo. La ŝlosilo, kiel plurfoje, estis en la fundo de la saketo. Fine ŝi trovis ĝin.

Tiam iliaj rigardoj renkontiĝis. *Sinjoro Dufour* (la kato) estis trankvile kuŝanta sur siaj kruroj, la flavaj okuloj estis direktitaj al la figuro de Mireille.


Ŝi malfermis la pordon; poste ŝi metis sur la tablon de la kuirejo sian korbeton.

La enirejan pordon ŝi fermis, dum la kato, kiu eniris kune kun ŝi, sekvis atente la movojn de la virino. *Sinjoro Dufour* ne estis vere la kato de Mireille.

Ĝia mastro estis sinjoro Alfred Lavalle, kiu loĝis en la najbara domo. La kato havis, kiel oni povas diri, amikecon al Mireille, kiu ofte regalas ĝin per bonaj manĝaĵoj. Ŝi tion faris ankaŭ ĉi-foje.

La besto demonstris kontenton per la granda "ronrono".

Poste la kato foriris tra la fenestreto super la kuireja lavpelvo. De tiu loko, la kato grimpis sur tegolojn de la tegmento, ĝis kiu etendiĝis la teraso de la najbaro Alfredo Lavalle. Tiu vojaĝo de la kato tien kaj reen, estis bona kialo por afablaj salutoj de ambaŭ najbaroj, kiam ili okaze vidis unu la alian. Ankaŭ tiutage la kato eksaltis sur la tegmenton, sed poste ĝi forkuris, ĉar matene sinjoro Lavalle laboris ĉe komerca buroo kaj li ne estis hejme.



*

Apud Sejno estas padoj el gruzoj, inter herboj kaj sovaĝaj floroj. La malgranda kafejo "Al la steloj" estis najbare de tiu "verda" angulo, kaj Mireille ofte renkontiĝis tie kun la amikinoj por agrablaj rendevuoj.

Tiutage la tuta kompanio dislokiĝis ĉe malnova restoracio, kie oni povis trovi la lokajn manĝaĵojn.

La amikinoj amuziĝis en konversacioj ĉe la bona tablo... Ili rememoras la jarojn de la lernejo, la kutimajn tagajn aferojn, la edziniĝojn, la vojaĝojn...

Iu el la amikinoj havis fotojn, kiujn ŝi montris al la kompanio.

La horloĝo de la apuda preĝejo frapis trifoje. "Lasta kafo"... "Salutoj kaj ĝis revidoj" ŝvebis en aero...

Poste Mireille restis sola enpense sur la padoj el gruzo.

*

Kiam ŝi revenis hejmen, ŝi aŭdis en la kuirejo iun, kiu frapis per malgrandaj batoj al la fenestro super la lavpelvo. Mireille tiam atente malfermis ĝin. Estis *Sinjoro Dufour*, kiu ne volis eniri, sed petis atenton de la virino. Ŝi rigardis tra la fenestro antaŭen: sur la teraso kuŝis Alfred Lavalle ŝajne preskaŭ morta.

*

La ĉambro de la hospitalo, kie kuŝis s-ro Lavalle, sur la dua etaĝo, estis en duonombro. Mireille eniris silente kaj atendis, ke li vekigis post la pasado de liaj vundoj.

Li malfermis la okulojn kaj feble ridetis.

Mireille sidis apud la fenestro: tra la kurtenoj estis refleksa lumo. Surprize Alfred rigardis la orflavan hararon, la belan mienon, la brilajn okulojn de la virino. "Venkita" li diris en si mem. Tiel komenciĝis interparolado ne facila, ĉar ambaŭ estis tre timemaj.

"Mi devas danki vin pro via helpo... Mi glitis sur la teraso... Mi povis tie morti.., — li diris. — Mi ne kapablis savi min memstare."

"Estis la kato kiu frapis al mia fenestro, — ŝi respondis ridetante. — Mi nur telefonis al la "preta sekurejo."

"Ho, jes... *Sinjoro Dufour*... Kiel ĝi fartas?"

"Bone... sufiĉe... ĝi dormas en ĝia kuŝejo ĉe la pordisto, ĝi manĝas ĉe mi kaj posttagmeze ĝi iras vin atendi en la terason."

"Post nelonge mi esperas reveni hejmen" — diris Alfred, kiu havis bandaĝojn ĉe la kapo kaj ĉe la brakoj.

Tuj sonorilo komencis sian muzikon.

"La vizitoj finiĝis". — "Ĝis morgaŭ, ĝis revido" — diris Mireille, kaj donis la manon al la viro.

"Mi esperas... mi vin atentos" — diris mallaŭte Alfred. Dum la manoj estis reciproke premitaj, kuris en anbaŭ plezurtremo... Ebla komenco de pli granda amikeco, kiu povas kreski en la grandan amon.

Yves Bruso
[DOUARNENEZ, Francio]

La bildon prezentis
Snejana Kononova
[N.Omka, Rusio]

Ĉu vi ne hontas, senhontaj abeloj?

Tradiciajn japanajn
poezierojn "hajkojn"
verkis nia leganto el
Francio *Yves Bruso*



"Ĉu vi ne hontas,
levi la jupojn de l' floroj,
senhontaj abeloj?"

*

Babilante, karesas
la rivereto siajn rulŝtonojn,
cent mil foje karesitajn.

*

Ho, blua floro
en la ĉerizujo?
Ne — ĉielpeceto!

*

Trinkita de la hundo
la lun' la flakon forlasis.
Kiel obskura nokto!

*

Vundanta rozarbeto,
ĉu vi forgesis la manon
kiu vin plantis?

*

La griloj estas
la muzikistoj
de la koboldoj. Ĉu vere?

*

Kiel lamenta,
Dio, la ĝemo de l' arbo,
kiun oni faligas.

*

Sorĉega nokto!
La steloj palpebrumas
unu la alian.

*

Urĝu, printempo!
Urĝu vin! Ĉar aprilo
vin atendas.

*

Glacieroj ĉe bordoj
de l' frostita lageto.
Ĉu frostas fiŝo?

Lokaina Ludmila

[Sudĵa, Rusio]

Besta alfabeto

Dalriĝo. Komenco

(A,B,C) en la numero 8-2001

Ĉ, D, E, F en 1-2002; G, Ĝ, H, I en 2-2002

K

Kien kraĉas kamelaĉo?
Kien kato kun katino
Kuras kvazaŭ kaprinoj?
Kiun kapro kornopikas?
Kiun kobro kolerigas?
Kiam koko kikerikas
Kaj kokinojn kolektigas?

L

Lamentante lamo lamas
La lamanta lamo larmas.
Leopardo, leonino
Liberigas leporinon.
Lila libelo
Liveras liberon.

M

Maljuna mulo maizon maĉas.
Malsata makako
maronon manĝas.
Musojn muŝoj maltrankviligas.
Mekanta muflono
melegron mirigas.


N


Nokta nebulo. Niksino.
Narkotas naivan najinon.
Nigraj nubetoj nomadas.
Noblaj najadoj naĝadas.
Nun najtingaloj ne nestas.
Nin nanduino neglektas.
Nur niktereŭto nocas,
Nutritajn numidojn nombras.


Por gajaj instruantoj


Klare kaj facile ilustru la uzadon de la "i"- derivaĵoj
en Esperanto.


rekomendas **Martin Ginette** [Saulxures/Moselotte, Francio]

i.. asertas pri unu aŭ pluraj,
sed ne diras precize 

ĉi.. prenas la tuton 

ti.. montras 

neni.. estas negativa 

Ki.. demandas 

Konsiloj de VikS

VikS=Viktor Sapojnikov [Jalutorovsk, Rusio]

Konsiloj al spertaj esperantistoj

1. Faru erarojn! Al ĉeestantoj estos agrable korekti vin.
2. Se vin deprimas manko de E-literaturo — verku mem.
3. Se el 26000 vortoj de la vortaro de Bokarjev vi uzas 260, diru, ke vi komencis traduki vortaron.

kaj scivolemaj lernantoj

Všivceva Tatjana [Miass, Rusio]

Daŭrigo. Komenco en "K"-2-02

Tatjana Všivceva prezentas por via atento "Gajan Gramatikon" - la famajn "16 regulojn" en humura aspekto. Ni rekomendas tiujn versetojn por kursgvidantoj kaj komencantoj.

Gaja Gramatiko

6. "-I"-finaĵon eĉ en PIVO
havas la infinitivo.

-i-

Ami, kuri kaj aŭskulti,
Kredi, veni, katapulto,
Manki — en reala vivo
Estas la infinitivo.

7. "-Is" prezentas preteriton,
Montras agon jam finitan.

-is-

Lulis, vibris, falis, zumis,
Pentris, dormis, foliumis,
Ie sidis, ie staris —
Ne plu agas, jam finfaris.

"-As" prezencon esprimanta,
Montras tempon nun estantan.


-as-

Amas, kudras, sonas, venas,
Tretas, portas, partoprenas,
Nun laboras, nun obstinas,
Faras, faras kaj ne finas.

"-Os" futuron montras, kiam
Dume faras ni neniom.

-os-

Poste zorgos, nokte vekos,
Morgaŭ venos, ne plu pekos,
Venkos nepre, ŝnuron ligos —
Iam ĉion realigos.



Bill Thorne
[Londono, Britio]

— La domo brulas!
— Tute ne. Oni ne povas diri: "La domo brulas", ĉar la domo ne povas bruli iu ajn. Sed eble estas permesata uzi la frazon, aŭ vorton "bruladas", por eviti uzon de la akuzativo, sed mi memoras ke anstataŭ de "bruliĝas" eminentulo skribis.....

Aleksandro Masiukas
[Murmansko, Rusio]

Plum-amikoj aŭ kelkaj konsiloj por dezirantoj korespondi

☞ ☜

La unua plezuro estas intelekta plezuro de la lernado de Esperanto.

La dua plezuro kaj la unua praktika uzado estas korespondado.

Esperantistoj povas relative frue ĝui la "plum-amikecon".

1. Estas bone ek-korespondi frue.

Korespondado tre bone atestas la efikan funkciadon de Esperanto (ankaŭ por parencoj, geamikoj, kolegoj kaj la molantoj...)

2. Ne necesas ekkorespondi tro frue.

La tipaj eraroj en diversaj landoj, (ekzemple, de francoj kaj de japanoj) ne estas la samaj, tial malfacilas eĉ diveni pri kio temas. "Leteraĉoj en "Fuŝ-peranto" senluziigos la korespondantojn.

3. Se vi deziras korespondi — unue lernu Esperanton!

Lernante Esperanton vi plibonigos scion de via nacia lingvo!

Via stilo devas esti tre simpla — pli bonas skribi naive simple, ol "gravmiene" komplike.

Se vi sentas vin preta por korespondi, la unua problemo estas: kiel trovi taŭgan korespondanton? Sed pri tio vi ekscios en la sekva numero...

daŭrigo

☐ Memkompreneble ĉiuj konsiloj taŭgas ankaŭ por ret-korespondado.

Neelpensitaj historioj

Okazintaj *al* aŭ tradukitaj *de* niaj legantoj

Anneke Schouten-Buys
[Apeldoorn, Nederlando]

Surprizo

Antaŭ trideko da jaroj mi laboris partatempe en tiuj matenoj kiam la edzo, Klaas, estis hejme por varti nian pli junan fileton. Ofte li tiam butikumis, ludis kun la fileto, sed ne prizorgis mastrumajn taskojn.

Iun tagon, kiam mi postlabore revenis, Klaas diris: "Mi havas surprizon por vi, en la kuirejo".


Mi ĉirkaŭrigardis, sed vidis nenion specialan; la manĝilaro ankoraŭ staris sur la kuireja tablo tiel kiel mi metis ĝin post la matenmanĝo, nenio alia estis farita, nenio aĉetita, kion li volus montri.

Sed kiam mi volis eklavi la manĝilon, mi trovis ke Klaas jam faris tion, sekigis ĉion kaj remetis tiel kiel ĉio staris antaŭ la lavado. Tiu ŝerceto estas jam familia historio tre ŝatata!

Larry Lowe
Federal Correction Institution
[Beaumont, Usono]

Originala tradicio

En la prizono, kie mi estas nun, ekzistas kutimo — kiam venas tempo al iu liberiĝi, li saturas siajn amikojn per akvo!



Pentris sur la paĝo
Nosova Katja, [Usojje-Sibirskoje, Rusio]



Martin Ginette
[Saulxures/Moselotte,
Francio]

Amuza loka kutimo



En la periodo de karnavalo vilaĝanoj preparas ŝercon. Ili kaŝe konstruas manekanon de iu "viktimo". La viktimo estas alia vilaĝano bone konata de ĉiuj. Al la manekano oni surmetas taŭgajn objektojn, por ke la viktimo povu sin rekonii. Ankaŭ la personoj, kiuj ne partoprenis en la sekreta fabrikado de la pajla homo, devos facile rekonii lin (aŭ ŝin): okulvitroj, falsaj haroj, iloj por lia laboro aŭ utilaĵoj por persona hobbio. Kaj dum la nokto la ŝercantoj pendigas la manekanon en videblan lokon, sur arbon aŭ sur foston, prefere tre alte.

La morgaŭan matenon la tuta vilaĝo bone ridas, kaj la pendigita homo devas regali per trinkaĵo la ŝercantojn. Nur en unu vilaĝo, nur unufoje jare, tio okazas, kaj bedaŭrinde, ne en la mia. Mi volonte farus similajn amuzaĵojn. Esti pendigita estas honoro, kiu signifas ke "oni" estas bonhumora homo.

Trovis kaj esperantigis
Nikonov Nikolao [Berjezovoje, Rusio]

Historio, simila al reala

Sidas mi foje vespere hejme, subite sonas la porda sonorilo. Mi malfermas la pordon. Ĉe la sojlo staras ebrieta virino, post ŝi — same ebria viro. La viro tiras sian kunulinon je la manon kaj diras:

- Iru ni for, tio ne estas lifto...
- Kial do ne lifto? Jen, vidu, ĝi jam venis!

Tempo kaj homoj

El la "Progresiga legolibro..." de nia korifeo William Auld "Paŝoj al plena posedo".

Paŝo naŭa. Artikolo de Stanislav Knizek. (fragmento)

Ni rekomendas al ĉiuj komencantoj kaj progresantoj nepre legi tiun ĉi libron.

Horloĝo — malgranda miraklo


La poŝ- aŭ brakhorloĝo konsistas proksimume el 100 diversaj partoj. Tiuj ĉi konsistajoj funkciigas unu la alian per matematika precezo. La malgranda balanciero, kiu reguligas la funkciadon de la horloĝo, kiu dum tagoj kaj noktoj, jarojn post jaroj senĉese persisteme moviĝas, plenumas tiamaniere la mirindan funkcion, kiu ne povas esti efektivigata de iu alia maŝino aŭ mekanismo.

Mi volas tion al vi pruvi per sekvantaj klarigoj.

La diametro de unu normala poŝhorloĝa balanciero mezuras 14-18 mm. Vi bone scias, ke ĝi turniĝas, pli precize dirite balanciĝas tien kaj reen. Imagu nun, ke la balanciero — anstataŭ tien kaj reen balanciĝi — ruliĝas nur unudirekten. En tiu ĉi kazo iu imagita punkto sur la perimetro de la balanciero, dum unu turniĝo je 360 angulaj gradoj, efektivigas 56,6 mm longan vojon. Sed la balanciero ne turniĝas je 360 gradoj, sed proksimume je 540 gradoj, tial unu turniĝo poste mezuras tien 84,75 mm kaj reen la samon. Dum unu sekundo la balanciero turniĝas ĉiam kvinfoje — do la punkto sur ĝia perimetro efektivigas vojon longan 423,75 mm, dum unu minuto 2542 cm (aŭ 25,4 m), dum unu horo ĝi faras 1525 m (proksimume 1 kaj duonon da km) kaj dum unu tago 36 km (precize 36,612 km).

Horloĝo kutime funkcias sen riparo 3 jarojn; dum tiu tempo la supozita punkto sur la perimetro de la balanciero efektivigas 39420 km longan vojon, kio egalas preskaŭ al la longeco de la ekvatoro. La balanciero turniĝas sur du pivotoj, kies diametro mezuras nur 0,12 mm.

Lokomotivo, kiu funkcias po 10 horoj tage per rapideco de po 45 km hore, devus funkcii 89 tagojn por efektivigi la saman vojon, kiun la balanciero plenumas dum 3 jaroj. La lokomotivo devus funkcii 8900 tagojn, t.e. dum 24 jaroj ĉiutage 10 horojn, ĝis ĝia akso farus la saman nombron de turniĝoj, kiun efektivigas la malgranda pivoto de balanciero dum 3 jaroj.



Nosova Katja [Usołje-Sibirskoje, Rusio]



El "Proverbaro" de L.L. Zamenhof

Antaŭe intencu kaj poste komencu.

Aĝo maljuna ne estas oportuna.

Aĝo tro matura ne estas plezura.

Aperas prudento, kiam pasis la momento.

Atendi bonan veteron kaj laman kurieron.

Atendi sur tero, ĝis sekiĝos la rivero.

Atendis, meditis, ĝis en tombon englitis.

Tempo flatas, tempo batas.

Tempo toleras, sed vero aperas.

Cent jarojn silentis kaj subite sin prezentis.

Dio longe paciencas, sed severe rekompensas.

Eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan.

Legante la antikvajn saĝulojn ni ĉiam trovas ion propran.

AFORISMOJ

Pri sporto, gimnastiko, futbalo...

Al la tutmonda futbala konkuro en Japanio-Koreo dedicatas...

Feliĉaj familioj estus pli multnombraj, se la edzoj klopodus kompreni siajn edzinojn, sed la edzinoj klopodus kompreni futbalon.

NN

Ekzistas opinio, ke futbalo estas "la afero de vivo kaj morto". Oni eraras: la futbalo estas multe pli grava.

Ben Sankli

Ne sufiĉas trafi per la pilko en golejon, necesas ankaŭ trafi preter golulo.

K. Melihan

Futbala televid-komentariisto — homo, kiu profesie malhelpas spekti futbalon.

M. Zvonarjev

Se homo ne deziras matene okupigi pri gimnastiko, nenio povas malhelpi lin.

Jogi Berra

La plej agrabla en la sportaj trejnadaj estas ripozo de ili.

NN

Se vi volas kolekti teamon, kiu gajnos konkuron "la saltado en altecon", vi serĉu unu atleton, kiu povas salti je tri metroj, sed ne tri atletojn, kiuj povas salti po unu metro ĉiu.

Fr. Terman

Ginette Martin

[Saulxures/Moselotte, Francio]

Oni ofte renkontas sian sorton sur vojoj, kiujn oni trairas por eviti ĝin.

Jean de La Fontaine

Ne en la kono kuŝas feliĉo, sed en la akirado de la kono.

Edgar Allan Poe

Ni havas finhaltigitajn ideojn ekde kiam ni haltas pripensi.

Ernest Renan

Laĉihin Aleksej

[Sosjva, Rusio]

La vortojn ni bezonas ankaŭ por kaŝi niajn pensojn.

Voltero

el kolekto de **Všivceva Tatjana**
[Miass, Rusio]

Silentu, aŭ diru ion, kio estas pli bona ol silentado.

Selgunov

Estas malfacile kapti nigran katon en malluma ĉambro, precipe, kiam ĝi tie ne estas.

banalajo

Tio, kio estas farita de homo, povas esti refarita de homo.

popola saĝo

La fino de la parolado gravas pli ol la komenco.

Bacon

Ne timu trolabori.

Selje

Larry Lowe [Beaumont, Usono]

Se ĉiuj provoj funkciigi aparaton malsukcesis — legu la instrukcion.

La homoj dividiĝas je du kategorioj: kiuj sidas en prizono, kaj kiuj devas sidi en prizono.

prizona ŝerco

Gravas ne venko, gravas partopreno !

Slogano de
Olimpikoj

Pjero
de Kuberteno

Al sportkonkursoj,

Al olimpikoj,


Plezure venas

amas-publiko.

Ĉar logas ĉiujn

la miskompreno:

Ne venko gravas, sed partopreno!



Bill Thorne [Londono, Britio]



Zujeva Margarita [Moskvo, Rusio]

— Mi tre ŝatas lavi manĝilaron
— Kial?
— Unue: neniu malhelpas, due: neniu envias.

— Diru vian naskiĝdaton.
— La 10-an de aŭgusto.
— De kiu jaro?
— De ĉiu.

Dmitrij [Volgograd, Rusio]

Du ebruloj eniras en la buson kaj veturas. Unu el ili demandas ŝoforon:
— Ĉu mi trafos per tiu ĉi buso la stacidomon?
— Ne.
— Kaj mi? - demandas la dua.


Anneke Schouten-Buys [Apeldoorn, Nederlando]

En *Stultul'Vilaĝo* oni havas novan trafiktabulon:
"Fino de la trafikcirklo".

Iun tagon du viroj el *Stultul'Vilaĝo* veturis per ŝarĝaŭtomobilo kaj alvenis al viadukto kun signo: "Maksimuma alto por veturiloj: 3,80 metrojn". Ilia veturilo altis kvar metrojn. Do kion fari? Unu viro eliris, ĉirkaŭrigardis kaj denove eniris, dirante:
— Pluen veturu, kolego, videblas neniu policano!

Pri studentoj

— Kial vi estas tiom magra? - avinjo en la buso kompatas studenton.
— Mi tre multe lernas.
— Evidente, vi estas bona lernanto. Ĉu mi helpu vin? Permesu teni vian mantelon.
— Tio estas ne mantelo, sed mia amiko — estas li, kiu plej bone lernas!



Korjuĥina Anna [Barnaul, Rusio]

Studento al sia kolego:

— Post kelkaj jaroj la homoj diros, rigardante al tiu ĉi domo: "Ĉi tie lernis studento Ivanov".
Voĉo de la profesoro:
— Se vi malsukcese ekzamenigos, oni diros tion jam morgaŭ!

La profesoro pri kemio ekzamenas studentojn. La lasta el ili respondas malbone kaj fine eksilentas.
— Nenio, - diras la profesoro, - ne konfuziĝu. Oni povas esti tre bona homo kaj ne scii kemion.
— Kaj male, — vespiras la studento.

— Studento Ivanov, kial vi ne aŭskultas min?
— Mi vin tre atente aŭskultas, s-ro profesoro!
— Tiam bonvolu ripeti miajn lastajn vortojn.
— Volonte. "Studento Ivanov, kial vi ne aŭskultas min?"

Pri mono


Parolas du amikoj.

— Vi ja estas pigrulo. Ĉe vi ĉiam mankas mono. Kial vi ne laboras?
— Oh, kiu diras! La plej granda mizerulo estas vi — neniam eĉ unu rublon povas pruntedoni!

Mi havas al vi du demandojn:
unue — kiom tio kostas;
due — kial tiom multe?

— Sinjoro, mi petas, donu al mi 500 rublojn, mi de la mateno nenion manĝis...
— Ankaŭ mi.
— Tiam donu unu milon, kaj mi invitos vin vespermanĝi kun mi!

— Ĉu vi aŭdis, ke la Centra Banko emisiis novan monbileton je la enhavo unu mil rubloj.
— Kiel? Ĉi ja ĵus emisiis. Ĉu ankoraŭ unu?



Korjuĥina Anna [Barnaulo, Rusio]


Ni ĉiam diris, ke proverbo rimata estas plej malgranda verso en Esperanto. Nia leganto el Brazilo Jose Roberto Tenorio brile montras, kiel fajne oni povas uzi la proverbojn por esprimi ajnan sencan kaj senton. Ankaŭ humuro ne mankas ĉe la suba rakonto. Jen estas bona ekzemplo, laŭ kiu vi povas provi verki vian propran rakonton.

Jose Roberto Tenorio [San-Paulo, Brazilo]

El mondo vuala kun adreso virtuala...

Dialogo inter du retanoj — Tuto kaj Saluto

- T — Bonvenu al la rondo amata!
- S — Dankon pro la saluto fratata!
- T — El kie vi tajpas?
- S — El mondo vuala kun adreso virtuala...
- T — Ĉu vi ja estas poeto aŭ havas klapon en la kapo?
- S — Ŝajnon ne fidu, juĝon ne rapidu.
- T — Via ludo tamen plaĉas al mi.
- S — Propra supo brogas, fremda allogas!
- T — Nu, permesu al mi demandi ion...
- S — Demandu tuj. Se elsatas la okazo, ĝi rompiĝas kiel vazo.
- T — Post kiom da jaroj, via opinio, la mondo agnoskos nian babiladon?
- S — Hako post hako estas la plej efika atako. Koncerne agnoskon, pli valoras interkonsento, ol juĝa dokumento.
- T — Nia babilado dume restas senvalora...
- S — Ankaŭ kulo nenion valoras, sed ĝia piko doloras.
- T — Nun mi ekkomprenas: ŝlosilo uzata ruston ne konas! Do, la sekreto...
- S — Ege simpla: unue – restu tajloro en via laboro; due – ne puŝu vian regularon en fremdan anaron.
- T — Kiu tion ripetas abunde, lernas plej funde.
- S — Kaj evitas grandan frakason en malgranda glaso...
- T — Tio meritas publikigon!
- S — Zorgu ke lerneja sekreto ne iru al gazeto.
- T — Al Komencanto, vi volas diri...
- S — Ŝerco dirite, cele pensite. Nu, alvenis fino al mia latino.
- T — Laboro finita — ripozo meritata!



Bill Thorne [Londono, Britio]

RIMARO



Bill Thorne

AVO

avo
flavo
glavo
kavo
klavo
konklavo
pavo
savo
sklavo

AZO

bazo
ekstazo
emfazo
frazo
gazo
jazo
nazo
topazo
vazo

EDO

baledo
bankedo
bedo
bufedo
bukedo
cigaredo
kabaredo
kasedo
kaskedo
kredo
ledo
medo
merkredo
monedo
oscedo
piedo
planedo
pledo
rimedo
torpedo

Invitoj kaj informoj

El Interreta mondo

Ĉu vi konas la eblecojn de Esperanto en la reto?

Vizitu la paĝon:

www.esperanto.net

La plej aktiva ret-adresaro de esperantistoj

<http://home.wxs.nl/~lide/adresaro.htm>

Vizitu kaj vi trovos la plej interesan aron da esperantistoj, kiuj retumas tra la tuta mondo. Ankaŭ vi povas aliĝi al tiu ĉi listo.

Kio estas Flavaj Paĝoj de Esperanto?

La flavaj paĝoj estas loko, en kiu estas multaj referencoj pri Esperanto Ĝi estas komunuze aktualigata kaj vi povas vidi la plej novan eldonon ĉe:

www.esperanto.net/veb/flavaj-pagxo.html

La retpaĝo de UEA

UEA — Universala Esperanto-Asocio havas tre simplan adreson:

<http://uea.org>

Ene de UEA retpaĝo vi povas trovi tre bonan librokatalogon de esperantaj eldonaĵoj:

<http://www.uea.org/katalogo/>

Nepre ret-vizitu

<http://esperanto.nu>

Tiu estas unu el la plej interesaj lokoj por esperantistoj. Ĝi estas kunordigata de Frank Luin (Svedio). Ĝi estas "Esperanto-Centro" kaj enhavas multon-multon interesan kaj utilan, nome virtualajn aktivaĵojn, bazon, anonctabulon, humurpaĝon, junularan forumon... Krom tio en ĝi ekzistas "eLibrejo" kun tre multaj E-libroj ekde la zamenhofaj ĝis la novaperintaj ĉe la adreso:

<http://esperanto.nu/eLibrejo/index.html>

Babilejoj

Internaciaj babilejoj plene konfirmas ke nia lingvo estas tre bona kaj viva komunikilo internacia. Unu el la plej konata E-Babilejoj troviĝas ĉe:

<http://lendar.karelia.ru/chat>

kiun vizitas esperantistoj de ĉiuj partoj de la mondo. Alia babilejo situas ĉe:

<http://babil.komputilo.org/plena>

Vojaĝo en Esperanto-Lando

Nepre menciindas inter lerniloj "Vojaĝo en Esperanto-lando. Perfektiga kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanta kulturo" de *Boris Kolker*. Oni povas aĉeti ĝin ĉe UEA libro-forme, estas tre bela.

<http://www.esperanto.mv.ru/Vojagxo/index.html>



Por niaj legantoj en Rusio

Estas multaj tre bonaj kaj altkvalitaj retpaĝoj. Pri "Rusia Esperantista Unio" vi trovos informojn ĉe:

<http://reu.da.ru>

Pri "Rusia Esperantista Junulara Movado" informiĝu ĉe:

www.tejo.org/rejm

La redakcio de KOMENCANTO planas informi pri la retpaĝoj de la landaj asocioj kaj pri la paĝoj de diversaj E-Organizaĵoj kiel SAT, Akademio, ILEI kaj aliaj.

Agrablan navigadon!

Kelkaj landaj kaj regionaj TTT — paĝoj

Aŭstralia Esperanto-Asocio	http://esperanto.org.au/
Esperanto-Asocio de Britio	http://www.Esperanto.demon.co.uk/
"Esperantogo" el Togolando	http://www.dromadaire.com/esperantogo/A/
Ĉilia Esperanto-Asocio	http://esperanto.cl/
Ĉina Esperantujo sur la reto	http://verdareto.com/esperanto
Esperanto Nederland	http://www.esperanto-nederland.nl/
Esperanto-Asocio de Irlando	http://www.iol.ie/~carsfm/
Greka paĝaro	http://www.Esperanto.gr/
Hispana Esperanto-Federacio	http://www.esperanto-es.net/
Jordana Esperanto-Asocio	http://www.geocities.com/waelalmahdi/jea.html
Kanada Esperanto-Asocio	http://www.esperanto.ca/kea/
Kartvelia Esperanto-Asocio	http://www.geocities.com/abuladze_2000/start.htm
Majorka esperantistaro	http://majorka.8m.com/main.html
Malta E-movado	http://maltaesp.hypermart.net/
Nepala Esperanto-Asocio	http://www.Esperanto.com.np/
Norvega Esperantista Ligo	http://www.esperanto.no/
"Okazintaĵoj en Japanio"	http://village.infoweb.ne.jp/~serpento/
Pollando	http://www.esperanto.pl/
Svisa Esperanto-Societo	http://www.fsu.ch/ses/
Unuiĝo Franca por Esperanto	http://www.esperanto-france.org/

Anoncetoj

Informoj

Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Por abonantoj de "K" - senpage.

19 ja, studento pri arto
Luis Eduardo Rea Gomez
Cupatitzio #25-304,
Col. Centro
CP 60 000,
Uruapan Michoacan,
Mexico
percebe13@hotmail.com

30-ja. edzo, komencanto, medicina sciencisto, int. pri naturo, historio, politiko, kulturo, lingvoj, volas interŝanĝi monerojn. Preferas korespondi surpapere.
Dr. Dallas Jason Grasby
4 Francis St., Bedford Park,
5042, South Australia
Aŭstralio

28 ja., virino, komencanto, pri diversaj kulturoj, landoj, lingvoj, ĉiuj sociaj temoj.
Marie Letarte
5200 rue Poitiers,
Trois Rivieres, Quebec,
Kanado
verte_olive@2hotmail.com

Bonvolu sendi ilustritan poŝtkarton. (8-jaraj)
Respondo garantiata.

Shelley Scutts
Cort vd Lindenstraat 115,
4463 Goes,
Nederlando

Mi estas 55-jara edziĝita viro. Volas korespondi kun ĉiaj aĝaj homoj, precipe paperpoŝte.

Angel Arquillos,
Anfora, 6-5-D. 29013
Malago
Hispanio

Kor. tm pri ĉiuj temoj, interŝ. pm., pk., monerojn.

Zhuang Qixiong
402/14 Jiao Fu Yin,
Fuzimiao, CN-210001,
Nanjing
Ĉinio

18-jara komencanto deziras korespondi kun eksterlandanoj por plibonigi sian Esperanton.

Aleksandr Derjugin
Kaukazskaja, 13 — 15
Saratov
410049
Rusio

17-jara lernantino deziras korespondi tutmonde pri sporto, modo.

Edyta Majchrzak
ul. Wawelska 23/17,
44217 Rybnik
Pollando

20-jara f-ino, afgana rifuĝinto serĉas plumamikojn

Mojhgan Vatanpur
Tabade 3, Buluk-e 2,
Shahrak-e Seyd ol Shohada,
Kh: Babai,
Yaft Abad, Tehran
Irano

20-jara f-ino, int. kristana muziko, sporto, vojaĝoj, volas kor. kun kristanoj, loĝas en Kinŝasa, Kongo

Tany Kunantu
<kunantu.tany@
caramail.com>

Komercanta esperantisto (24 ja.) dez. kor. tutmonde por praktiki siam lingvovozon, interesiĝas pri fremdaj lingvoj, psikologio, literaturo, muziko, komputiloj.

Dariusz Piatkowski
p.dariusz@wp.pl

Mi loĝas en unu modesta ĉambro kun dunivela lito. Mi serĉas turistan esperantiston kunloĝanton en bonega, urbocentra kvartalo apud grandaj parkoj kaj urba trafiko. Minimume 2 ĝis 6 monatoj, 200\$/monate. Eblas propra ĉambro somere.

Mijl Blonstejn,
316 W 95th St.,
apt. 744,
New York,
N.Y. 10025,
USA

nijl_nachum@yahoo

Prokopjev Dmitrij [Ĉaŝi, Rusio]

Esperanto-
KOOPERATIVO
"D-ro Zamenhof"
deziras trovi korespondamikojn por siaj membroj, pri ĉiuj temoj tutmonde pere de retroŝto

stcankov@viket.net

Bonvolu noti novan retroŝtan adreson de **KOMENCANTO**

komencanto@r66.ru

viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!

